

Eduard Ebel,  
Leise rieselt der Schnee

Leise rieselt der Schnee,  
still und starr ruht der See,  
weihnachtlich glänzet der Wald.  
Freue dich, Christkind kommt bald!

In den Herzen ist's warm,  
still schweigt Kummer und Harm,  
Sorge des Lebens verhallt.  
Freue dich, Christkind kommt bald.

Bald ist heilige Nacht,  
Chor der Engel erwacht,  
hört nur, wie lieblich es schallt:  
Freue dich, Christkind kommt bald!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas  
EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 –  
†1905).*

*MR-012-3 / Arg-99-198 (2014-04-23  
17:57:42)*

*Vidu ankaŭ: [http://de.wikipedia.org/wiki/Leise\\_rieselt\\_der\\_Schnee](http://de.wikipedia.org/wiki/Leise_rieselt_der_Schnee).*

Eduard Ebel,  
Flustre falas la neĝo,

*tradukita de Josef Kühnel*

Flustre falas la neĝo.  
Lag' rigidas laŭ leg'o.  
Kristfeste brilas arbar'o.  
Ĝoju pri Kristo, homar'o!

Varma estas en kor'o.  
Foras ĉiu dolor'o.  
Fuĝas la vivoamar'o.  
Ĝoju pri Kristo, homar'o!

Sankta nokta lumbril'o  
kaj ĉiela jubil'o  
logas laŭ ĉarma fanfar'o:  
Ĝoju pri Kristo, homar'o!

*Traduko de la Germana poemo  
“Leise rieselt der Schnee”  
de EDUARD EBEL (Eduardo  
Ebelo, \*1839 – †1905) en Es-  
peranton de Josef Kühnel.*

*MR-012-JK-1 / Arg-99-202  
(2010-09-18 19:50:56)*

*MR-012-JK1*

Eduard Ebel,  
Milde falas la neĝo,

*tradukita de N. N. 01*

Milde falas la neĝo,  
Lago silentas en preĝ'o,  
Arboj en brilblanka vest'o.  
Ĝoju pri kristnaska fest'o!

Nun varmiĝas la kor'o,  
Ĉesas ĉagren'o kaj dolor'o,  
Ĝoju pri Dia ĉeest'o.  
Ĝoju pri kristnaska fest'o!

Sankta nokto de Di'o,  
Vekas anĝelhoron ĝi,  
Sonas ĉarmega atest'o:  
Ĝoju pri kristnaska fest'o!

*Traduko de la Germana poemo  
“Leise rieselt der Schnee” de  
EDUARD EBEL (Eduardo Ebe-  
lo, \*1839 – †1905) en Espe-  
ranton de N. N. 01.*

*MR-012-NN-1 / Arg-99-201  
(2003-12-11 08:46:13)*

*MR-012-NN-1*